



Programŝanĝoj kaj novaj programeroj

ĴAŬDO

Psikologio - (Inter)kompreno kaj Komunikado

14h00-15h00, salono Nĕmec

En scienca psikologio ekzistas multe da kono, kiun vi povas uzi por plibonigi vian vivon kaj viajn projektojn. Tamen tiu kono ofte ne estas konata, aŭ ne uzata. Ĉi-tiu prelego temas pri la integrado de psikologio en via persona vivo, socio kaj projektoj.

Kunlaboro inter Esperantocentroj

15h00, salono Izák. Interesiĝantoj pri kunlaboro inter Esperantocentroj kolektiĝos ĉe la salono Izák, kiel origine anoncite en la kongresa libro. Ni interkonsentos ĉu kunveni pri la centroj en Izák kun ILEI aŭ ĉu iri komune al alia loko.

VENDREDO

Afrika Kunveno

12h30-13h15, salono Dolinský

Ateliero pri multlingvismo

13h00-14h00, salono Kalocsay. Por permesi al ĉiuj homoj, kiuj volis partopreni, sed pro ia kaŭzo ne sukcesis, la Ateliero pri Multlingvismo inter Esperantistoj reokazos. Homoj, kiuj jam partoprenis, bonvolu ne malkaŝi la funkciadon de la Ateliero!

Kongresa Temo 4

16h00, salono Maliarik (ne plu en salono Dolinský, kiel anoncite)

Prelego pri Gravitaj Ondoj

16h00, salono Dolinský (ne plu en salono Maliarik, kiel anoncite)

Kultura Esperanto-Festivalo

Ties unua kunsido okazos en la manĝangulo malantaŭ la kongresa informejo je la 16.30, tuj post la koncerto de Kimo. Ĉiu interesato estas bonvena!

Revena transporto al la Viena flughaveno en sabato

La transporto por la reveno al la viena flughaveno (VIE) okazos en sabato, 30-a de julio, je la 14h00, de la parkejo antaŭ la konstruaĵo Bernolák. Kaze de malmulta interesiĝo la servo estos nuligita, do, rapidu rezervi vian lokon.

Post forlasi la pasaĝerojn en la flughaveno la buso pluiros al la fervoja stacio Hauptbahnhof en Vieno.

Prezo: 22 EUR (por persono) - Bv. rezervi la lokon ĉe la Ekskursu Giĉeto.

Esperanto-arbo plantita

Solena plantado de Esperanto-arbo okazis la 26-an de julio 2016 antaŭ la aŭlo de Slovaka agrikultura universitato en Nitro. La arbon plantis partoprenantoj kaj gastoj de la 101-a Universala kongreso de Esperanto: vicurbestro Ján Vanĉo, vicrektoro de SAU Ján Gaduŝ, direktorino de Botanika ĝardeno Erika Mňahonĉáková, prezidanto de UEA Mark Fettes kaj prezidanto de LKK Peter Baláž. La Esperanto-arbo estas Efolia tilio (*Tilia cordata*), kiu estis aĉetita dank' al financa kolekto de esperantistoj-vojaĝantoj.

J. Vajs, KN 69



FEROA DANCO

okazos subarbe en la MANĜANGULO malantaŭ la kongresa informejo ĴAŬDE je la 14a horo kaj VENDREDE je la 17/a horo.

M. Strid, K.N. 1220.

Eblas vojaĝi al Vieno ankaŭ per normala aŭtobuso kun ŝanĝo en Bratislavo. Aŭtobusoj el busstacio de Nitro ekiras ekzemple je 13.15, 14.15 kaj 15.15 kaj vojaĝo al Bratislavo daŭros unu horojn kaj 15 minutojn. El Bratislavo la aŭtobusoj al Viena flughaveno kaj Vieno ekiras ekzemple je 14.30, 15.00, 15.30, 16.00 kaj 16.20 (el la sama busstacio, kien alvenas busoj el Nitro). El Bratislavo al Viena flughaveno vojaĝo daŭras unu horon. Konsultu <https://www.busbud.com> pri prezoj.

Salutparolado al la Mezeŭropa Forumo Interreligia

Kiel iama prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, kaj nome de la nuna prezidanto, d-ro Mark Fettes, mi alportas al vi hodiaŭ la salutojn de nia 101-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu disvolviĝas samtempe kun tiu ĉi forumo kaj en kunlaboro kun ĝi.

Estas aparte taŭge, ke ĝuste nun kaj ĝuste ĉi tie okazu tiu ĉi forumo. La kreinto de la internacia lingvo Esperanto, Lazar Ludwik Zamenhof, kreis tiun lingvon por ebligi la internacian interlingvan komunikadon en epoko de enormaj intelektaj kaj teknologiaj ŝanĝoj fine de la 19-a jarcento. Ĝi kaj ĝiaj adeptoj kontribuis al la paca kaj konstrua debato pri tiuj ŝanĝoj – sed tiuj kontribuoj neniel sufiĉis por malhelpi la kolapson de tiuj aspiroj en la mizera kaj sangoplena katastrofo de la Dua Mondmilito.

Sed ni plenumis nur parton de la Zamenhofa vizio. Zamenhof emfazis ne nur la kapablon interkompreniĝi, sed ankaŭ la deziron interkompreniĝi. Por li, Esperanto estis esence nur perilo de la kompreniĝo: ĉe la unuaj adeptoj restis la defio uzi Esperanton por trovi la komunajn elementojn inter la homoj, ĉefe la komunajn elementojn plej profundajn – en iliaj kredoj kaj religioj. La esperantistoj tutmondigis la lingvon, sed ili ne sukcesis tutmondigi la plej profundajn esperojn de Zamenhof.

Kiel krei en nia dividita mondo la deziron interkompreniĝi? Por fari tion necesas ne nur mem kredi, sed

ankaŭ kompreni kiel aliaj kredas, kaj trovi la komunajn elementojn, kiuj ebligas plene internacian, plene tutmondan senton de karitato, kompato kaj la deziro kunlabori.

Ni frontas krizon de kunlaboro en la nova epoko de enormaj ŝanĝoj, en la epoko, kiam la sumo de homaj atingoj pligrandiĝas, sed ankaŭ la sumo de homa mizero, kaj kiam la konkero de la naturo riskas detrui tiun naturon, de kiu nia vivo kaj tiu de ĉiuj aliaj estaĵoj, dependas. Ne sufiĉas atenti pri la atingoj: necesas ankaŭ atenti pri tiu mizero, kie ajn ĝi okazas, ĉar sen tiu atento ni detruos ankaŭ niajn grandegajn atingojn, kaj sen tiu atento ni perdos la homan spiriton, kiu devas esti nia ĉefa motivigo.

En tiu laboro ni estas aliancanoj. Nia Asocio aparte subtenas la Celojn por Daŭripova Evoluigo, kiujn lanĉis Unuiĝintaj Nacioj; vi laboras por la daŭripovo de la homa spirito. Se Zamenhof ĉeestus hodiaŭ, li certe estus inter viaj plej fortaj kunlaborantoj. Mi deziras al vi ĉiun sukceson en tiu ĉi via iniciato.

Mi kaptas la okazon inviti vin viziti nian kongreson ĉi tie en Nitro. Ĝi daŭras la tutan semajnon. Ni volonte montras al vi la laboron, kiun ni faras en tute apuda kampo – en ambaŭ sencoj de tiu vorto.

Humphrey Tonkin
Nitro, la 25-an de julio 2016

Rezultoj de Belartaj Konkursoj de UEA en 2016

BRANĈO POEZIO

Unua premio al Antonio Valén, Hispanio pro “Paralele”
Dua premio al Benoît Philippe, Germanio pro “Mathias”
Tria premio al Aleksandro Mitin, Rusio pro “Agemaj homoj kuras al sukceso”
Honora mencio al Valentin Melnikov, Rusio pro “Ironiaj hajkoj”
Juĝkomisiono: Anja Karkiainen, Gerrit Berveling, Giulio Cappa
Partoprenis 39 verkoj de 18 aŭtoroj el 15 landoj

BRANĈO PROZO

Unua premio al Jesper Lykke Jacobsen, Francio pro “La paradiza turo”
Dua premio al Lenke Szász-Praid, Rumanio pro “La heliko kaj la lacerto”
Tria premio al Ewa Grochowska, Francio pro “Malbenitaj skaraboj”
Tria premio al Amir Naor, Israelo pro “Anĝela”
Honora mencio al Steven D. Brewer, Usono pro “Krepusko sub fago”
Juĝkomisiono: Ĵak Le Puil, Eliza Kehlet, Tim Westover
Partoprenis 25 verkoj de 18 aŭtoroj el 12 landoj

BRANĈO TEATRAĴO

Unua premio ne aljuĝita
Dua premio al Amir Naor, Israelo, pro “La situacio”

Tria premio ne aljuĝita
Honora mencio al Raffaele del Re, Italio pro “Teleskopoj ne funkcias”
Juĝkomisiono: Wera Blanke, Paul Gubbins, Giuliano Turone
Partoprenis 3 verkoj de 3 aŭtoroj el 3 landoj

BRANĈO ESEO

Unua premio – premio Luigi Minnaja - al Rafael Henrique Zerbetto, Brazilo pro “La influo de Esperanto en la verkaro de Joao Guimaraes Rosa”
Dua premio al Jorge Camacho Cordón, Hispanio pro “La vartisto de vortoj”
Tria premio al Jesus Moinhos Pardavila, Galegio pro “La arkitekturo de deziro en la verkoj de Tarkony”
Honora mencio al Jesus Moinhos Pardavila, Galegio pro “Poŝtkarto el la genra tranĉeo: kio okazis al niaj verkistinoj?”
Juĝkomisiono: Detlev Blanke, Gotoo Hitoshi, Giridhar Rao
Partoprenis 7 verkoj de 6 aŭtoroj el 5 landoj

INFANLIBRO DE LA JARO

Eldonejo Bjelovara E-Societo pro “La trajno en la neĝo”
Juĝkomisiono: Edmund Grimley Evans, Kitagawa Hisasi, James Rezende Piton
Partoprenis 4 verkoj de 4 eldonejoj el 4 landoj

Sukcesa starto por IKU/AIS kaj gravaj informoj por la sekvo

La plej riĉa scienca programo komenciĝis, kun bona partpreno en la unuaj IKU-prelegoj. Aparte estis popularaj la prelegoj pri Astrobiologio (Wandel) kaj Silka Vojo (So) kun ĉ. cent aŭskultantoj. En la Scienca Kafejo okazis kvar prelegoj pri interesaj kaj tre variaj temoj (la kvina prelego de Astori ne okazis).

Por ĵaŭdo kaj vendredo estas kelkaj anoncoj:

Ĵaŭde (11-13) fine de la du lastaj prelegoj de la IKU/AIS kursoj de Alcalde kaj Wandel okazos facilaj kaj mallongaj ekzamenetoj en kiuj ĉiuj partoprenantoj estas invitataj partopreni, por taksii sian komprenon kaj ne malpli grave - la sukceson de la preleganto komprenigi la materialon. Ĉiuj kiuj partoprenos en la ekzamenoj ricevos AIS-atestojn dum la publika disdonado kadre de la Scienca Forumo, vendrede 13-14:30.

En la Scienca Forumo oni ankaŭ okazigos publikan debaton pri la estonto de la scienca agado en Esperanto, i.a. pri estonta kunlaboro inter AIS, ISAE, UEA kaj STEB, oni informos pri la grandaj ŝanĝoj en la agado de AIS, deciditaj dum ĝia senatkunsido en lundo, kaj disdonos la Premion Pirlot por la plej bonaj sciencaj verkoj en 2010-2015 en kvar branĉoj.

Vendrede (16-17) okazos la publika popularnivela prelego pri la lastatempa epokfara malkovro de gravitaj ondoj, sed en la salono DOLINSKÝ kaj ne kiel aperas en la Kongresa Libro. Ĝi havos tradukon en la slovakon por la ne-esperantistaj gastoj. Se vi konas slovakajn potencialajn interŝantojn, bv. disinformi.

Amri Wandel, KN 452

Kiel plej efike lerni lingvojn?

En sia ripeta prezentado (pro la manko de lokoj en salono dum la unua prezentado) Lýdia Machová (Slovakio) prezentis sian metodon lerni lingvojn, per kiuj ŝi jam lernis dekon de lingvoj.

Ŝi prezentis kvar principojn por lingvolernado. Unue, necesas amuziĝi por lerni la lingvon. Necesas fari amuzajn aferojn ekzemple aŭskulti podkastojn aŭ legi pri temoj, kiuj interesas la lernanton.

Due, necesas multe da kvanto por lerni, do multe da tempo. La lernanto devas multege praktiki la lingvon, aŭskulti la lingvon kaj se li aŭ ŝi volas lerni paroli, necesas praktiki paroladon. Bezonatas multaj horoj ĉiusemajne.

Trie, la ofteco de lernado gravas. Pli bone estas lerni iomete ĉiutage ol dum pluraj horoj unufoje semajne. Eblas lerni lingvon, ekzemple dum kurado aŭ kuirado aŭskultante surbendigaĵojn el sia telefono per la lernata lingvo.

Kvare, necesas lerni sisteme, do uzi multe da tempo kaj ne seniluziĝi, kiam aperos malfacilaĵoj. Por transpasi la limon al flua parolo necesas lerni plu post la komencanta nivelo.

Utilaj por lernado estas laŭ Lýdia podkasto, do radioprogramoj, kiuj aŭskulteblas el interreto en preferata tempo kaj ne nur tiam, kiam la elsendo okazas. Eblas instali

al sia telefono aplikaĵon, per kiu eblas trovi podkastojn en diversaj lingvoj.

Ankaŭ dulingvaj libroj estas bona rimedo por lerni. Se teksto aperas paralele per lernata lingvo kaj per lingvo, kiun la lernanto jam bone konas, eblas legi rekte la tekston en lernata lingvo kaj kontroli el alilingva versio, se iu frazo aŭ vorto restas nekonata. Se ne troviĝas dulingvaj libroj kun paralelaj tekstoj, eblas uzi du librojn en diversaj lingvoj. Se lernanto legas 2-3 paĝojn tage, post kelkaj monatoj li legas libron jam per nova lingvo.

Vortprovizo en la nova lingvo estas tre grava, kaj tion eblas kreskigi per vortlistoj laŭ metodo de Goldlist (ora listo). Laŭ tiu metodo la lernanto skribas 20 vortojn en kajero kaj laŭlegas ilin, kaj ripetas tiujn vortojn nur post 14 tagoj, tiam la lernanto jam lernis eble 30% el vortoj, kaj tiel restas por plua lernado nur tiaj vortoj, kiuj estis malfacilaj. La dusemajna periodo estas grava, ĉar tiel la vortoj restos en longedaŭra memoro. Tamen eblas en sekva tago lerni aliajn 20 vortojn kaj tiel rapide kreskigi vortprovizon.

Se ne troviĝas parolanto de la lingvo, kun kiu eblas diskuti en propra loĝloko, eblas trovi kunparolanton per interreta servo italki.com kaj paroli rete per skajpo.

Por ne miksi lingvojn inter unu al alia, Lýdia rekomendas lerni novan lingvon per alia lingvo, ekzemple ŝi mem lernas la rusan per la pola. Ŝi ankaŭ diris, ke se ŝi komencus lerni lingvojn denove ekde la komenco, ŝi lernus Esperanton kiel la unuan fremdan lingvon. Gramatiko, laŭ ŝi estas esenca, sed necesas nur lerni tiom da gramatiko, kio estas bezonata por tiu celo, por kiu la lernanto lernas la lingvon. Oni ne devas lerni la gramatikon per gramatikaj klarigoj, sed eble nur per multaj ekzercoj. Kaj ne necesas timi erarojn, ĉar ili helpas lerni la vortojn, post unu grava eraro la ĝusta vorto restas firme en la memoro.

Ŝia konsilo al lingvolernantoj estas "Ne forgesu lerni lingvojn amuze, ofte, sisteme kaj multe!"

Ligoj por menciitaj lingvolernaj helpiloj:

- www.huliganov.tv/goldlist: klarigo de la metodo Ora listo (transskribo de vortlistoj en kajero)
- www.italki.com: retpaĝo por trovi lingvopartnerojn
- Podcast & Radio Addict: aplikaĵo por aŭskulti podkastojn (registraĵojn) en multaj lingvoj

Oni povas trovi pli da informoj pri Lýdia Machová ĉe www.language mentoring.com.

Jukka Pietiläinen

La kongresa koruso kantas slovake

Por la kongreso en Nitro la aktuala direktoro de la Internacia Koruso aparte preparis pecojn kun slovaka etoso, ja ne nepre lingve, sed certe laŭ la emocioj. Kantemuloj, kiuj maltrafis la unuan ekzercadon, povas ankoraŭ aliĝi. Bv. veni al la salono Zvara ĵaŭde (14h45).

La kongreslibra anonco pri koncerto de la koruso invitas al la salono Maliarik vendrede (14h30), kie pro la salonaj cirkonstancoj pli konkrete la koruso ofertas komunan kantadon. Muzikŝatantoj sentu sin kore invititaj.

Podkasto kun kongresanoj

La podkasto movada-vid.punkto elsendas ĉiutage tuje diskutojn kun gravaj partoprenantoj de la UK. Ni jam elsendis diskutojn kun Mark Fettes kaj Martin Schäffer pri UEA kaj unu pri Lingvo-instruado kun Mireille Grosjean kaj Katalin Kováts.

Pliaj elsendoj estas planitaj, por kiuj ni bonvenigas aŭskultantojn en la radio-ĉambro, kiuj povas aktive partopreni la diskuton kun niaj gastoj.

La planitaj elsendoj estas:

Ĵaŭdo, 27-a de julio 15:00

Temo: UK 102 en Seulo

Gasto: Lee Young-Koo kaj Ho Song de la LKK de UK 102

Vendredo, 28-a de julio 18:45

Temo: Esperanto-kulturo

Gastoj: Anna Löwenstein kaj Chuck Smith

Ankaŭ rigardu la paĝon <http://movada-vid.punkto.info> por pli ĝisdataj informoj aŭ posta aŭskultado de la diskutoj.

Minoritatoj en Slovakio

La Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL) havas la kutimon organizi fakajn prelegojn pri etnaj kaj minoritataj problemoj dum UK. Ĉijare Pr. Eva Poláková, kiu laboris en kulturcentroj romaaj kaj hungaraj, do fakulino pri la minoritataj popoloj en Slovakio, proponis sin. Dekoj da kongresanoj kolektiĝis dimanĉe posttagmeze en la salono Izak por ŝin aŭskulti. La minoritatoj ja estas influataj de la kulturo de la plej multoj kaj ŝatas adaptiĝi kaj foje, eĉ kaŝi sian identecon, kiel faras ofte la romaoj. Kaj la hungaroj, kiuj pli bone parolas sian lingvon, preferas serĉi laboron en Hungario. Ĝis la jaro 2000 la romaoj estis bone akceptitaj, sed pro diversaj kialoj, tiu amo perdiĝis. La aŭskultantoj vigle debatis post la prelego kaj japana partoprenanto demandis, kial la eŭropanoj tiom malamas romaojn. Tre ofta senlaboreco reganta inter ili pro malapero de iliaj tradiciaj metioj certe akiris la problemon, respondis la ĉeestanto.

Alain Favre (KN 761) kaj Nicole Margot (KN 780)

Jubilea kunsido de kristanoj

La tradicia Ekumena Diservo okazis dum la dua kongresa tago en la preĝejo de Sanktaj Petro kaj Paŭlo.

La Diservon gvidis sacerdotoj Serhij Prudko (Ukrainio) kaj Marius Dygny (Litovio), la prezidanto de KELI Philippe Cousson (Francio) kaj pastorino Corinna Scweiger (Germanio). Muzike akompanis Stefan Lepping, orgenoj kaj Felice Sorosina, fluto. La diservon ĉeestis ĉ. 150 kongresanoj. Post la diservo okazis la dimanĉa meso en Esperanto.

Mardon okazis la kunveno de kristanoj, kiun partoprenis kvardeko da kongresanoj. Dum la kunveno oni informis pri la kongresoj kiujn IKUE kaj KELI organizis pasintsemajne.

Estis ebleco al la kongresanoj prezenti la retejojn de IKUE

kaj KELI, kaj Facebook de IKUE, sed ankaŭ la retejojn de Espero katolika, kaj radio-elsendoj de Radio Vatikana en Esperanto (oficiala vatikana retejo kaj la arkivo).

La kunsido estis iasence jubilea. Nome, laŭ la disponeblaj informoj la unua komuna kunsido de IKUE kaj KELI okazis dum la UK en la jaro 2001.

Dum la semajno antaŭ UK en Slovakio kongresis kaj IKUE (en Nitra) kaj KELI (en Bratislava) kaj estis organizita komuna ekumena programo en Bratislava.

Oni planis ankaŭ dum la UK okazigi ĉiutage la mesojn en Esperanto. Bonvole la preĝejoj de Staj Petro kaj Paŭlo por tio disponigis ties parohestro.

La lasta UK-meso okazis merkredon kaj ĝi samtempe estis la dank' meso pro ĉiuj bonaĵoj kiujn ni ricevis dum ĉi tiu kongreso. Pro ne disponeblo de pastro, la mesoj ne okazos dum lastaj tri tagoj de la UK.

La kongresanoj povos viziti du foto-ekspoziciojn (Papo Francisko kaj Sanktulo de la mizerikordo) en la Porpastra seminario, Pribinovo namestie 5 (survoje al la katedralo-kastelo).

Marija Belošević, KN 234

Ateistoj debatis pri islamo

Tre sukcesa estis la publika kunveno en mardo de Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo (ATEO), en kiu partoprenis almenaŭ 65 homoj en plena salono. Ili vigle debatis la temon de la kunveno “kresko de la islama loĝantaro en Eŭropo kaj la reaga kresko de islamofobio - ĉu minacoj al demokratio?”

Prezentis la temon Nyegosh Dube, kiu montris statistike, ke la proporcio kaj plimultiĝo de islamanoj rilate al la ĝenerala loĝantaro ne estas tiom alta, kiom oni emas supozi. Eŭropanoj kutimas supertaksi tiujn ciferojn, kaj sondado dum la kunveno montris, ke ankaŭ niaj ĉeestantoj emfazis, ke estas grave distingi inter islamo kaj politika islamo. Same asertis neĉeestanta araba esperantisto loĝanta en araba lando, kies kontribuo estis laŭlegita de Nyegosh.

Ĉu islamanoj en Eŭropo plene distancigas sin de islamismaj teror-atakoj? Pri tio ĉi la partoprenantoj havis malsamajn perceptojn. Oni komentis, ke la gazetaro ne sufiĉe atentigas pri la kondamnoj kontraŭ tiaj atakoj fare de la islama komunumo.

La ĝenerala konkludo de la kunveno estis, ke la islama loĝantaro de Eŭropo plejparte ne prezentas minacon al demokratio kaj okcidentaj valoroj, kontraste al politika islamo.

Nyegosh Dube, KN 998 kaj Anna Löwenstein, KN 447

Elŝutu la ciferecan version de Pribina!

Fotu la jenan kodon per via poŝtelefono por elŝuti tiun ĉi kaj la aliajn numerojn de la Kongresa Kuriero.

